Insbesondere nimmt zur Herausbildung des Kommunikationsmotivs bzw. zu dessen Absicherung im Esperanto-Unterricht die kognitiv-problemhafte Unterrichtsgestaltung als motivaler Faktor einen beherrschenden Raum ein.

Die Anwendungsbreite dessen, was im sprachlich-strukturellen Bereich der Fremdsprache erkannt und erarbeitet wird, kann für den Lernenden selbstbewußtseinsstärkend erlebbar werden. Damit rückt das kommunikative Ziel unseres Fremdsprachenunterrichts in diesem Fach in erreichbare Distanz, wie anhand von Lehrplänen für Esperanto im Bereich der Sprachtätigkeiten verdeutlicht werden soll:

Esperanto-Lehrplan für polnische Schulen: (20)

1. Unterrichtsjahr
(3 Stunden wöchentlich)

Thematik / Sprechen, Lesen Schreiben

Schule:
Umgebung des Schülers und der Unterricht; Lernen und Freizeit.

Wohnung und Familie:
Mitglieder der Familie und deren Tätigkeit; Wohnung; technische Geräte in der Wohnung (z. B. Radio, Fernseher, Telefon, Waschmaschine, Kühlschrank, Staubsauger); Hilfe des Jugendlichen im Haushalt; persönliche Hygiene, Haustiere.

Kalender:
Bezeichnung der Wochentage, Tageszeiten; Monatsnamen, Jahreszeiten, Datumsangabe, Wetter, die Uhr, Zeitangabe.

Warschau:
die Hauptstadt Polens (Straßen, Plätze, Parks, Verkehrsmittel).

Gedichte und Lieder.

Lexik:

600 lexikalische Morpheme

2. Unterrichtsjahr
(2 Stunden wöchentlich)

Thematik / Sprechen, Lesen, Schreiben

Aus dem Leben in Schule und Familie (unter Beachtung von Freundschaft und kameradschaftlicher Hilfe, Einhaltung der Ordnung und Arbeitsdisziplin, Achtung gesellschaftlichen Eigentums).
Ferienerinnerungen (z. B. Ferienlager, Ausflüge in die interessantesten Gegenden des Landes).
Sport, kulturelle Veranstaltungen (Kino, Theater).
Aus dem Leben des Ortes. Straßenverkehr, Einhaltung der Verkehrsvorschriften; Fahrt im Autobus, O-Bus, in der Straßenbahn. Einkauf in Läden und an Kiosken; Farben, Maße, Materialien, Geld.
Aus dem Dorfleben in den einzelnen Jahreszeiten. Gedichte, Lieder, Sprichwörter, Anekdoten.
Abfassen von Briefen.

Lexik:

300 — 400 neue lexikalische Morpheme

3. Unterrichtsjahr
(2 Stunden wöchentlich)

Thematik / Sprechen, Lesen, Schreiben

Aus dem Leben der Schüler in Polen und in anderen Ländern (in der Schule und außerhalb des Unterrichts). Eisenbahn-, Flug- und Schiffsreise; auf der Post (Absenden von Karten, Briefen, Päckchen; Geldüberweisungen). Aus dem Leben in Stadt und Dorf in Polen und in anderen Ländern; Tätigkeiten der Menschen in der Industrie, im Handel, in der Landwirtschaft usw. Einige technische Geräte und Arbeitsplätze; Entwicklung der Technik.
Gedichte, Anekdoten, Sprichwörter, geflügelte Worte. Lektüre leichter Texte.

Lexik:

300 — 400 neue lexikalische Morpheme.

In ähnlicher Weise und thematischer Breite sind auch die Lehrpläne bzw. deren Entwürfe in anderen Ländern angelegt. Der ungarische Lehrplanentwurf für das 1. Unterrichtsjahr an Schulen (2 Stunden wöchentlich, d. h. 66 Stunden im Jahr) sieht die produktive Beherrschung von 500 lexikalischen Morphemen vor. Zur Zielstellung im Sprechen heißt es:

„Der Schüler ist befähigt, im Rahmen der behandelten Themen:

— eine einfache Rede in Esperanto zu verstehen (bekanntes Wortmaterial);
— eine leichte Konversation anzuknüpfen oder an ihr teilzunehmen;
— einfache Bilder zu beschreiben und Fragen dazu zu stellen bzw. Fragen zu beantworten;
— den Inhalt eines gelesenen Textes nachzuerzählen; Fragen zu stellen bzw. auf solche zu antworten.“ (21)

Eine erfolgreiche sprachliche Kontaktaufnahme zu Angehörigen anderer Sprachgemeinschaften mittels der Plansprache Esperanto ist demnach unterrichtlich einplanbar; die daraus resultierenden Anregungen für den Lehrer hinsichtlich der differenzierten Interessenberücksichtigung entspricht einem höchst aktuellen Anliegen des Fremdsprachenunterrichts, da hierdurch die Lernmotivation (in unserem Falle vorrangig das Kommnikationsmotiv) alters- und entwicklungsspezifisch aufrechterhalten werden kann.

In einer Schweizer Darstellung dieser Problematik im Fremdsprachenunterricht wird formuliert:

„Die einzelnen Ziele des Unterrichtsprogramms werden für Esperanto dieselben sein wie die, für die wir im ersten Kapitel beim Englischen eine Liste aufgestellt haben. Die fünf Ziele betreffen im wesentlichen die Sprachkenntnisse, jedoch gestattet die Einfachheit der Esperanto-Grammatik einen viel rascheren Einsatz der gelernten Begriffe.

Deshalb wird das Grammatikstudium nach und nach verschiedenen Tätigkeiten Platz machen, die je nach sprachlichen Fähigkeiten und persönlichen Interessen ausgewählt werden können. Durch eine grafische Darstellung läßt sich das Verhältnis zwischen Grammatikstudium und Wiederholung einerseits und konkretem Sprachgebrauch andererseits wie folgt veranschaulichen:

erstes Jahr

zweites Jahr

drittes Jahr

Der spitze Winkel im Bereich der konkreten Sprachanwendung zeigt die Phase an, in der eine stärkere Bereicherung auf allgemeiner Ebene erfolgt, wogegen die Strahlenbündel die fortschreitende Spezifizierung der Praxis angeben, bei der wir in der Rangordnung ihrer Wichtigkeit folgende Ziele festhalten möchten:

a) Die propädeutische Funktion . . .
b) Die Verbindung zwischen Sprachstudium, persönlichen Interessen oder Hobbys . . .

c) Die Verbindung zwischen Sprache und geisteswissenschaftlichen Disziplinen ...

d) Die Entwicklung des Interesses für das internationale Leben ...

e) Analyse der kulturellen Wurzeln der Originalliteratur in Esperanto ...

f) Reisen und Begegnungen ..." (22)

(Die Verflechtung der einzelnen Motive miteinander, wie sie in diesem Zitat sichtbar wird, ist unbestritten; aber gerade in dieser Verbindung wird die umfassende Bedeutung des Kommunikationsmotivs besonders deutlich.)

Ein Vergleich der oben gebrachten Lehrplanausschnitte und der darin deutlich werdenden Zielstellung in der mündlichen Sprachbeherrschung mit den „Lehrprogrammen für das Lehrgebiet Sprachkundigenausbildung" (23) bzw. mit den Ausführungen in der „Didaktik des Fremdsprachenunterrichts / Deutsch als Fremdsprache" (24) berechtigt zu der Hypothese, daß

— entweder bei gleicher Stundenzahl wie im Ethno-Fremdsprachenunterricht eine bedeutend höhere Kompetenzstufe im Esperanto erreicht werden kann; oder

— bei wesentlich gekürzter Unterrichtszeit ein quantitativ gleicher, aber qualitativ höherer Beherrschungsgrad des Esperanto als einer Ethno-Fremdsprache erreichbar ist.

XXXXXX

Forpasis produktiva literaturisto:

d-ro Karl Schulze 1910-1983

La 2an de julio 1983 forpasis la membro de la Centra Estraro de Esperanto-Asocio de GDR, d-ro Karl Schulze. La esperantistaro de GDR perdis en li la plej produktivan tradukiston. D-ro Schulze, kiu realiĝis al la Esperanto-movado fine de la 60aj jaroj, rapide tiel enprofundiĝis en la lingvon, ke li povis jam baldaŭ prezenti bonegajn manuskriptojn de mondliteraturaĵoj. Aperis en lia traduko 1974 la fama romano „Nuda inter lupoj" de Bruno Apitz. Kaj jam 1977 sekvis la mondkonata „Trigroŝa Romano" de Bertolt Brecht. Li estis konstante ĉefkunlaboranto por la GDR-eldono de „Paco" kaj por „der esperantist". Por ambaŭ revuoj li multe tradukis kaj verkis recenzojn. Ankaŭ en la oficiala serio de „Paco" (eldonata en Sofio) aperis multaj rakontoj. Bedaŭrinde ne ĉio povis aperi, kion la forpasinto finpretigis. Ankoraŭ restas neeldonitaj la tradukoj de Faŭsto (ambaŭ partoj!), la „Kalendaraj rakontoj" de Brecht, la novelo „Mario la magiisto" de Thomas Mann kaj de la sama aŭtoro „Lotte en Weimar". Li krome fintradukis „La kverelo pri la serĝento Griŝa" de Arnold Zweig kaj pli ol 500 paĝojn da moderna literaturo el GDR (rakontoj). Do — ankoraŭ multo restas por eldoni.
D-ro Schulze ankaŭ verkis fojfoje pri gramatikaj temoj. Li estis aktiva en la Centra Estraro de GDREA, en la grupo Prenzlauer Berg en Berlin, kaj ĉiam konstruive kunlaboris. Elstaris lia humanisma mondkoncepto, kiu ĉiam senteblis en liaj diskutkontribuoj aŭ personaj konversacioj.
Ni honore gardos lian memoron.

CE de GDREA

TRADUK — KONKURSO[1] Tasko 3

Rekorde des Jahres

Die Hallenser waren in der Erwartung großer Dinge zum traditionsreichen Freundschaftsvergleich DDR—UdSSR in das Stadion gekommen. „Natürlich liegen die Rekordprotokolle bereit“, meinte damals Günter Preuß, der bei keiner Leichtathletik-Veranstaltung in der Saalestadt fehlt. Er fügte hinzu: „Ramona Neubert hat natürlich schon Maßstäbe mit ihren 6716 Punkten gesetzt. Aber ich tippe dennoch auf einen neuen Rekord.“

Der neue Rekord, das wäre der dritte Streich der blonden Dresdnerin nach den 6621 Punkten, die sie im Jahr zuvor in Halle erziehlte, und den genannten 6716 Zählern vom Kiewer Vergleich UdSSR—DDR aus dem nacholympischen Jahr. Doch, obwohl insgeheim auch an einen neuen Weltrekord glaubend, ließ sie sich nach außen hin nichts anmerken. Ja, sie wies sogar

Spekulationen nach den ersten Disziplinen zurück.

„Ein Mehrkampf hat seine eigenen Gesetze. Nur ein Patzer, der selbst in der Schokoladendisziplin möglich ist, und alles ist dahin“, dämpfte sie die Erwartungen. Nach 13,59 s über die 100 m Hürden, 15,10 m im Kugelstoßen, 1,86 m im Hochsprung und ausgezeichneten 23,14 m im den ersten Tag abschließenden 200 m Lauf hatte sie 3900 Punkte gesammelt. Soviel wie noch nie eine Siebenkämpferin vor ihr. Auch das eigene „Halbzeit“-Ergebnis vom Weltrekord-Siebenkampf in Kiew war damit um 14 Zähler überboten. Also: neuerliche Weltrekord-Prognosen?

Konzentriert beendete sie ihren Tag im Stadion. Den 200 m folgte noch eine Disziplin, für die es keine Punkte gab. Und die dennoch dazugehört: das sorgfältige Auslaufen. Erste Vorbereitung für den neuen Tag mit seinen folgenden drei Disziplinen.

Wir wissen es seit langem. Ramona verbesserte ihren Weltrekord. Nach 6,84 m im Weitsprung, 42,54 m im von vielen Mehrkämpferinnen noch immer gefürchteten Speerwerfen und nach 2:06,16 min über 800 m hatte sie 6772 Punkte zusammengetragen, ihre alte Höchstleistung um 56 Zähler übertroffen. Und während sie Glückwünsche empfing, löste sich die Anspannung. „Rekordgedanken habe ich tatsächlich erst nach dem Speerwerfen aufkommen lassen. Eigentlich habe ich mich über die 42,54 m ein wenig geärgert, denn im Training habe ich beständig weiter geworfen.“ Dann ließ sie der Freude ihren Lauf und trollte sich zum Auslaufen. Denn auch der gelungene dritte Streich war nur ein Meilenstein auf dem Weg zum erstrebten EM-Titel in Athen.

[1]) Vgl. „der esperantist“ 1/1983, 2/1983

(Aus: Deutsches Sportecho)

XXXXXX

Kondiĉoj:

Partopreni povas unuopuloj kaj kolektivoj. Ni distingas la plej bonan solvon por ĉiu unuopa tasko kaj tiun por la tuta jaro per libropremioj. La tradukoj estu tajpitaj kun 3 bone legeblaj kopioj kaj sendendaj al Dieter Berndt, 1020 Berlin, Berolinastr. 2.

Limdato por la ensendo estas ĉiam du monatoj post la apero de la unuopaj numeroj. La kontribuojn oni ne resendas al la sendintoj. Ĉiu partoprenanto ricevas informon pri la rezultoj. Tiuj ĉi kondiĉoj anstataŭas la presitajn en „der esperantist“ 1/83, p. 8.

Heinz Hoffmann

Esperantlingvaj anoncoj per laŭtparolilo en fervojaj stacioj

Por antaŭenmarŝo de Esperanto gravas ties praktika utiligo. Ĉiu el ni serĉu sur sia tereno aferojn, en kiuj jam hodiaŭ Esperanto eventuale helpus solvi problemojn. Taŭga objekto por trovi aplikeblojn estas ekzemple internacia pasaĝera trafiko. Ties pli kaj pli akriĝanta informadproblemo postulas novajn raciajn solvojn.

Por *optika* informado el pasaĝeroj eksterlandaj oni aplikas ne nur fremdlingvajn tekstojn, sed ankaŭ bildsimbolojn. Tiuj „piktogramoj" estas internacie unuecaj, klarigitaj per tabeloj en horarlibroj kaj ebligas kelkajn koncizajn informojn al ĉiuj pasaĝeroj — sendepende de ilia lingva kompreno. En *akustika* informado mankas rimedo kun avantaĝoj similaj al tiuj de piktogramoj.

Pro tio la fakgrupo Fervojistaj Esperantistoj en Kulturligo de GDR ellaboris jenan konkretan proponon: En stacioj kun granda internacia pasaĝera trafiko oni anoncas per laŭtparolilo gravajn trafikinformojn antaŭ alveno de trajnoj direktataj al fremdlingvaj landoj ne sole nacilingve, sed ankaŭ — kiel ripeto — en Esperanto. Oni preferu internacie konatajn vortojn. Jen la tri plej gravaj informfrazoj:

1. Atentu! Ĉe perono . . . enveturas trajno „. . . . . . ." de . . . . al . . . . tra . . . .
2. Atentu! Trajno „. . . . . . ." de . . . . al . . . . alvenos . . . minutojn post plantempo.
3. Atentu! Trajno „. . . . . . ." de . . . . al . . . . startos ĉe perono . . . . Mi ripetas: . . . .

La frazojn kaj necesajn numeralojn oni publikigu sur afiŝoj — kaj en Esperanto kaj en lingvoj de plej multaj eksterlandaj gastoj. La afiŝon oni fiksu apud giĉeto por informado aŭ por vendo de internaciaj biletoj. Pasaĝeroj, kiuj volas uzi la novan informrimedon, povas relative facile encerbigi al si la malmultajn frazojn kaj numeralojn sen lerndevo de la lingvo mem.

Trafika altlernejo „Friedrich List" en Dresden subtenis klopodojn por esplori la publikan komprenon. Tie oni eksperimentis kun 98 gestudentoj. Oni disdonis klarigajn foliojn kun la tradukita teksto kelkajn tagojn antaŭ la eksperimento, sed ne permesis uzi la klarigilojn dum la eksperimento. Tiam okazis imitado de kvin anoncoj — unufoje ripetitaj. Jen la rezulto:

Fakto	Kompreno
Enventuro de trajno	94 %
Malfruiĝo de trajno	99 %
Peronoŝanĝo	96 %
Entute	97 %

Numeralo	Kompreno
Kvar	69 %
Ses	84 %
Sep	92 %
Dek ok	73 %
Dek naŭ	77 %
Dudek kvin	67 %
Tridek	92 %
Entute	79 %

Krom tio pli frue la fakgrupo eksperimentis kun neesperantistoj — sen dono de iu ajn klarigo —, pri 30-minuta malfruiĝo. Partoprenis entute 183 nur personoj el 5 landoj (Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Pollando, Sovetio). Ke temas pri malfruiĝo de trajno, komprenis 72 %, numeralon „tridek" 50 % d personoj.

Nun necesas diskuti pri ĝustaj vojoj al laŭpaŝa realigo. Laŭ mia opinio ni konsideru jenajn tri etapojn de la relative longa vojo:

1-a etapo

En kelkaj landoj ni serĉu urbojn, en en kiuj haltas internaciaj trajnoj kaj vivas aktivaj esperantistoj-fervojistoj jam bone kontaktantaj kun la stacia estraro aŭ kun pli supera fervoja gvidinstanco. La aktivuloj.

— turnu sin al la estraro por ricevi permeson pri realiga eksperimento kaj por klarigi detalojn,

— varbu kelkajn laŭtparolistojn, kiuj pretas — post sufiĉa instrukcio kaj lingvotrejnado — anonci esperantlingve ripete al nacilingva anonco alveno de trajnoj al eksterlando,

— organizu kreadon de menciita afiŝo kaj eventuale helpilojn por laŭtparolistoj.

Certe tiu ĉi afero ankoraŭ ne povas esti oficiala; sed ofte oni serĉas agadobjektojn por movado de junularaj racionalistoj. Eventuale en tiu kadro eblas forta helpo. La aktivuloj nepre korespondu reciproke. Certe necesas egaj streĉoj por longtempe daŭrigi unuan etapon. Do post unuaj sukcesoj aktivulo kun bonaj kontaktoj al estraro de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) klopodu pri preparo de dua etapo.

2-a etapo

Oni fondu komisionon en kadro de IFEF pri jenaj ĉefaj taskoj:

— Kolekti spertojn el la 1-a etapo por plue evoluigi la aferon

— Kunordigi kaj subteni koncernan agadon de la aktivuloj

— Plivastigi aplikon de la nova inform-rimedo

— Kontakti kun estraroj de ŝtatfervojoj kaj internaciaj fervojaj organizoj OSĴD / UIC por prepari 3-an etapon

3-a etapo

Oficiala apliko nur realigeblas laŭpaŝe en unuopaj landoj. Unua sed gravega paŝo estas publikado de tabelo laŭ la afiŝo en fervojaj horarolibroj malantaŭ piktogramklarigo. Sekvas enkadrigo de la nova informrimedo en koncernaj deĵoraj instrukcioj.

Bonvolu skribi pri viaj ĉi-koncernaj opinioj kaj indikoj al

Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR
Fakgrupo Fervojistaj Esperantistoj
DDR — 1080 Berlin, Charlottenstraße 60.

Esperanto kaj filatelo

Informoj pri novaj poŝtaj Esperanto-stampoj

(Numeroj respondas al la stamp-katalogo de Burmeister)

ARG	3	Cordoba	1972	1.4.	17a nacia E-kongreso
ARG	4	Rosario	1973	19-22.4	18a nacia E-kongreso
BEL	15	Brux.-Brussel	1975	4.7.	bruselo-nordkapo
BEL	16	Liege	1976	1.12-15.1	E-Langue Internationale (ms)
BEL	17	Verviers	1977	15.12-15.1	E-Langue Internationale (ms)
BEL	18	Borgerhout	1978	7.4.	Esperanto (pm-ekspozicio)
BRA	27	Sao Paulo SP	1976	15.12.	Tago de Esperanto
BRA	28	Marilia SP	1978	17-22.7	1-a latinamerika E-kongreso
BRA	29	Sorocaba	1978	15-18.12	Filatela E-Ekspozicio
BRI	13	Swanwick	1979	13-20.7.	52-a SAT-kongreso
BUL	8	Sofia	1978	13.7.	63a UK (FDC-UTK)
BUL	9	V. Tarnovo	1978	22-29.7	34a TEJO-kongreso
BUL	10	Varna	1978	29.7-5.8	63a UK
FRA	43	Grenoble	1977	feb-majo	Nacia E-kongreso
FRA	44	Cl. Ferrand	1978	13.3-15.5	Kanzona E-Konkurso
FRA	45	Cerny	1979	31.3	Nacia E-kongreso
GDR	3	Leipzig	1979	4-10.7	IFER 1979
GDR	4	Finsterwalde	1979	9-14.3	Medicinista E-renkonto (vi, ni)
GFR	29	Paderborn	1977	28-29.5	Eúropa E-kongreso
GFR	30	Augsburg	1977	30.7-5.8	50a SAT-kongreso
GRE	3	Ateno	1976	2.8.	61a UK
HIS	19	Ferrol d. C.	1976	21-24.8	36a nacia E-kongreso
HIS	20	Sabadell	1977	20-24.7	37a nacia E-kongreso
HUN	55	Budapest	1976	28.12	6a VEF
HUN	56	Tatabanya	1977	14-15.5	E-klubo 20-jara
HUN	57	Zsombo	1977	15.5	9a pacrenkontiĝo
HUN	58	Gyula	1977	3-9.7	15a SEU
HUN	59	Abaliget	1977	10-19.7	10a IREN
HUN	60	H'vasarhely	1977	20.7	Medicina E-renkonto
HUN	61	Budapest	1977	15.12	Zamenhofa jubileo
HUN	62	Budapest	1977	28.12.	7a VEF
HUN	63	Budapest	1978	14-16.7	27a nacia E-kongreso
HUN	64	Abaliget	1978	17.7	11a IREN
HUN	65	Budapest	1978	28.12.	8a VEF
HUN	66	Szeged	1978	20.5	11a pacrenkonto
HUN	67	Miskolc	1979	30.6.	Fervojista E-renkonto
HUN	68	Gyula	1979	8.7	SEU 79
HUN	69	H'vasarhely	1979	9.7.	2a IMEK (as)
HUN	70	Abaliget	1979	16.7	12a IREN
ISL	1	Rejkjavik	1977	2-5.8	62a UK
ITA	26	Massa	1976	19-20.9	47a nacia E-kongreso
JAP	21	Tokio	1977	27-28.8	90 jaroj Esperanto
JAP	22	Kobe	1979	11-12.8	66a nacia E-kongreso
JUG	24	Prilep	1976	29.7	20a nacia E-kongreso
JUG	25	Ohrid	1977	23.4	E-societo Skopje
LUK	2	Luxembourg	1978	1-9.9	E-Langue Internationale (ms)
MAL	1	Valletta	1978	18-20.5	E-ekspozicio
POR	1	Coimbra	1978	17.6	6a nacia E-renkonto
POL	117	Czestochowa	1977	18.8	37a IKUE-kongreso
POL	118	Czestochowa	1977	15.12	90 jaroj Esperanto
SVE	23	Kungäly	1979	2.6	Sveda jarkongreso
SVI	9	Luzern	1979	1-28.2	64a UK (ms)
SVI	10	Luzern	1979	28.7-4.8	64a UK

XXXXXX

Familia spektaklo
Enloĝanto de Churchill (Kanado) telefone petis informon de filmteatro pri la komenco de la posttagmeza prezento, kiun li kun familio volis viziti. La direktoro de la evidente malmulte vizitata kinejo afable redemandis: „Nu, kiam vi do povus esti ĉi-tie?“

Tempomanko
La vesperon antaŭ lia morto amiko vizitis la saĝulon Sokrates en la karcero kaj vidis, ke muzikinstruisto instruis al li kanton sur liro. Surprizite la amiko demandis lin: „Morgaŭ vi devos morti kaj hodiaŭ vi ankoraŭ lernas novan kanton?“ Sed Sokrates respondis: „Kiam alie mi lernu ĝin?“

KOMUNIKO

Inter la 7-a kaj 12-a de decembro 1982 en Bad Saarow (GDR) okazis internacia seminario sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio pri „Aktualaj problemoj de scienca kaj teknika aplikado de Esperanto".

La organizinto — Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR — gastigis 34 fakulojn el 11 landoj (Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danio, Federacia Respubliko Germanio, Francio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Italio kaj Svedio). Ili aŭskultis kaj pridiskutis 25 prelegojn pri

1) te rminologiaj principoj kaj ilia aplikado al la faklingvo de Esperanto, kun konsidero de apartaj taskoj de Terminologia Sekcio de Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto,

2) rezultoj de aplikado de Esperanto en diversaj scienco-branĉoj kaj fakoj, interalie pri la aktualaj taskoj de Scienca Eldona Centro de UEA.

La partoprenintoj interkonsentis pri la jenaj konkludoj:

KONKLUDARO I.

Aktualaj taskoj pri la disvastigo kaj evoluigo de Esperanto sur fakaj terenoj

Pro la pligraviĝo de la rolo de la scienco kaj tekniko en la evoluo de la socio, ankaŭ en la Esperanto-movado fariĝis necese pligrandigi la evoluon de la fakaj aplikado kaj disvastigo de la lingvo. El tio sekvas **taskoj** realigendaj parte ene de la movado, parte en kontaktiĝo kaj kunlaboro kun la ekstermovadaj fakaj medioj, kies plenumon la partoprenantoj de la Seminario rekomendas:

1. Estas necese evoluigi la **terminologion** laŭ Konkludaro II.

2. Estas necese evoluigi la **fakliteraturon**

2.1. Periodaĵoj ĝeneralkarakteraj okupiĝantaj parte pri la fakrilataj problemoj kaj publikigantaj artikolojn pri sciencaj branĉoj kiuj ankoraŭ ne kapablas estigi propran fakrevuon estas plu necesaj.

2.2. Periodaĵoj unufakaj estas ĉiam bonvenaj kiam la koncerna fakularo atingis sufiĉan nombron kaj forton por daŭre vivteni ilin.

2.3. La reprezentantoj de la eldonejoj de la fakaj periodaĵoj devus pritrakti la eblecon por komuna abonigo de siaj periodaĵoj (abono por scienca „revuaro"), tiamaniere pliekonomiigante kaj plicertigante la aperadon. Tiu pritraktado povus okazi dum la sekva, Budapeŝta Universala Kongreso.

2.4. Oni devas laŭeble helpi la aperigon de kiu-ajn-tema scienca aŭ popularscienca libro (traduko aŭ originalaĵo), se la ekonomieco estas iamaniere certigita.

2.5. Pli malpli sistema plano estas necesa por la eldonado de fakaj lernolibroj unuavice pri la bazaj sciencoj (matematiko, fiziko, kemio, biologio) sur nivelo de la kutimaj unua kaj dua studjaroj de natursciencaj kaj teknikaj universitatoj.

3. Estas necese plu daŭrigi la disvolvon de individuaj kaj grupaj personaj fakkontaktoj, en ĉiuj formoj (korespondado, personaj renkontiĝoj, seminarioj, konferencoj k.a.).

3.1. Oni devas daŭrigi kaj al pli kaj pli da landoj disvastigi la jam sukcese realigitajn iniciatojn pri la aranĝado de fakaj kunvenoj dum ĝeneralaj Esperanto-aranĝoj kaj de memstraj fakkonferencoj (ekz. AEST-oj, IMEK-oj) sur landa kaj internacia niveloj. Tiuj fakkonferencoj, simpozioj, seminarioj okazas plejparte pri la rezultoj de tiel vasta spektro aŭ grupo de sciencaj branĉoj aŭ fakoj, kiu atingas ke sufiĉa nombro da interesintoj povu partopreni, sed ili dediĉu spacon ankaŭ por la problemoj de la evoluigo de la Esperanta faklingvo kaj de la disvastigo de Esperanto en fakaj rondoj.

3.2. La plej fruktodona metodo por la plifortigo de la faka agado estas la kontaktiĝo kun ne-esperantistaj fakaj organizaĵoj kaj instancoj (landaj kaj internaciaj), ebliganta reciprokajn utiligojn de siaj fortoj por la komunaj kaj certaj apartaj celoj. Surbaze de utila partopreno en laboro de ne-esperantistaj fakorganizaĵoj la esperantistaj fakuloj povas atingi eĉ ke la ne-esperantista organizaĵo aranĝu aŭ helpu aranĝi fakan konferencon kun Esperanto kiel laborlingvo. (ekz. Internacia Kibernetika Konferenco '80 kaj '83, SVIEKO '81 kaj '84, INTERKOMPUTO '82, Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo de la Sciencoj '82). Oni devas atingi ke la ne-esperantistaj fakorganizaĵoj reprezentiĝu eĉ per prelegoj en la E-lingvaj fakkonferencoj, krome ke ili donu lokon al Esperanto-rilataj informoj en siaj organoj.

4. Estas necese zorgi pri la supergrada faka instruado en Esperanto. Eble jam dum la sekva UK oni devas pritrakti la fondon de Instituto por Post-Diplomaj Kursoj kiu utiligus la kunlaboron de

plej diverslandaj kaj plej altnivelaj fakuloj kapablaj instrui sian fakon en Esperanto.

5. Estas necese prepari kaj permanente ĝisdatigi la bibliografiojn (kun indiko de la trovlokoj de la raraĵoj) de la ekzistanta fakliteraturo kaj kolekti tiujn valorajn fakajn manuskriptojn kiuj pro iu kaŭzo ne povas presite aperi disponigi ilin al interesiĝantaj fakuloj.

6. Estas necese ebligi pli efikan laboron de la esperantistaj fakaj organizaĵoj. Oni devas pritrakti dum la sekva UK, iaspecan kunfandiĝon de la fakaj organizaĵoj kun UEA ke per kuntiro kaj simpligo de la administraj taskoj la faka membraro pli efike povu sin dediĉi al fakaj laboroj. UEA donu helpon por faka agado ankaŭ al fake neorganiziĝinta fakularo. Oni daŭre devas zorgi pri ĝisdatigo kaj publikigo de fakaj adresaroj.

7. Esenca pliefikigo de la informado pri la faka aplikado de Esperanto kaj enkadre de la E-movado (nun: Budapeŝta Informilo, sed estonte ankaŭ la revuo Esperanto) kaj por la neesperantistaj fakaj medioj estas nepra kondiĉo por la plua evoluo. Apartan studon bezonas la ekonomiaj problemoj de la multlingveco kaj la kvanta pruvo de la utilo de Esperanto ĉi-rilate.

8. En ĉiaspeca supreskizita agado oni devas nepre zorgi pri la financa bazo (abonado, antaŭmendo, reklamoj, subvencioj k. a.).

9. En la plenumo de la supreskizitaj taskoj ĉiuj kompetentaj unuopuloj kaj diversgradaj organizaĵoj povas kaj devas partopreni. Specifan rolon devas havi la Scienca Eldoncentro (SEC de UEA) precipe pri la taskoj listigitaj sub punktoj 2.4, 2.5 kaj 5. Same SEC — krom propra agado koncerna — devas okupiĝi pri konsilado en preskaŭ ĉiuj supre menciitaj terenoj, precipe koncerne la internacian kunordigadon de la agadoj.

10. SEC tre bezonas helpon kaj kunlaboron de fakuloj en sia agado (precipe en verkado, tradukado, selektado, lingva-faka reviziado, redaktado de siaj eldonaĵoj, interalie tiu de la Sciencaj Komunikaĵoj)

KONKLUDARO II.

Evoluigo de la terminologia laboro

La partoprenantoj de la Seminario

1. konscias, ke en ĉiuj lingvoj la faklingvo devas submetiĝi al racia planado, des pli en la planlingvo Esperanto.

2. konscias, ke faka aplikado de Esperanto disvolviĝis kiel esenca parto de la ĝenerala evoluo de la lingvo, kaj ke por la evoluigo oni devas atenti ĉiam la kvalifikitan laboron jam faritan;

3. plene aprobas, ke la Terminologia Sekcio de la Scienta Eldon-centro de UEA en Budapeŝto ne nur havu rolon registran kaj kunordigan sed ankaŭ lingvonormigan;

4. rekomendas evoluigi la terminologian agadon sur scienca nivelo laŭ principoj de sistemigo, klasifiko kaj difinado kun la celo atingi normigon. Plue rekomendas efektivigon de kleriga agado pri terminologiaj metodoj kaj principoj;

5. alte taksas la moralan kaj materian subtenon de UEA, specife de ĝia Scienca Eldoncentro, por disvolvado de kvalifikita terminologia agado sub la tegmento de UEA;

6. aprezas la historie establitan favoran sintenon de la Akademio de Esperanto al ĉiaj tiucelaj kvalifikitaj agadoj kaj rekomendas, ke la Terminologia Sekcio klopodu kunlabori kun ĝi kaj ĉiuj aliaj faklingvaj institucioj de la Esperanto-movado;

7. petas la Akademion de Esperanto kaj aliajn koncernajn instituciojn esplori la funkciadon de faklingva normigado en naciaj lingvoj kun la celo apliki la internacie establitan procedon por Esperanto.

Bad Saarow, 1982-12-11.

(Komparu la raporton en „der esperantist“ 1/83)

Redakcia informo

Bedaŭrinde ankoraŭ ne finiĝis la aperkrizode „der esperantist“. Ni ŝanĝis la presejon, kio kompreneble rezultas malfacilojn. Krome la fakto, ke prespretaj manuskriptoj longe kuŝis en la alia presejo kondukis al iuj strangajoj. Ekz. reaperis la kokludaroj I kaj II de la seminario pri scienceteknika apliko de Esperanto 1982 en Bad Saarow nun ankaŭ en n-ro 3/83, kvankam ili jam estis presitaj en n-ro 1/83. Do — jen kiel facile la redaktoro povas perdi superrigardon. Ni tamen esperas, ke la legantoj fidos al ni, ke baldaŭ ni denove havos pli normalan eldonritmon de nia revueto. la red.

Gratuloj

Werner Plate: 70-jara

Jam kiel knabo Werner Plate aliĝis al la Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) kaj kunlabnoris jam tiam kun Rudi Graetz. Post la fondo de Centra Laborrondo li fariĝis unu el la aktivaj kaj entreprenemaj esperantistoj en la norda regiono de GDR kaj havas multajn meritojn kiel prezidanto de la Distrikta Estraro Rostock. Okaze de lia 70-anaskiĝtago la 18-an de septembro 1983 ni kore gratulas al nia senlaca jubileulo.

Richard Partecke: 60-jara

La membro de la Centra Estraro Richard Partecke el Eisenach festos sian 60-an naskiĝtagon la 15-an de decembro 1983. Li multe engaĝas sin por la apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko, gvidas la Scienc-Teknikan Komisionen de GDREA kaj aparte komptentas pri terminologio de aviado. Korajn gratulojnal la vigla jubileulo.

Erich Würker: 80-jara

Vigla kaj energia li estas, kaj oni ne vidas la 80 jarojn. Erich Würker, kiu festos tiun gravan vivojubileon la 26-an de decembro apartenas al la fondintoj de la Esperanto-movado de GDR kaj al ties Estraro kaj iama Centra Laborrondo. Li gvidis sennombrajn kursojn, faris prelegojn kaj ankaŭ tradukis beletron kaj sciencan literaturon. Substrekinda estas lia helpemo por aliaj distriktoj kaj grupoj. La jubileulo dum multaj jaroj gvidis la Distriktan Laborrondon en Karl-Marx-Stadt kaj apartenis ankaŭ al la Prezidia Konsilantaro de Kulturligo. Ni kore gratulas al la aktiva jubileulo.

Ni kore gratulas

— al Johanna Bräutigam, Meißen, kiu festis la 4an de februaro 1983 sian 85an naskiĝtagon

— al Arthur Mildner, Pirna, kiu festis la 22an de septembro 1983 sian 85an naskiĝtagon,

— al Oskar Walter, Zittau, okaze de lia 80a naskiĝtago, la 1an de decembro 1983,

— al Erich Seidemann, Dresden, kiu festis sian 75an naskiĝtagon la 23an de majo 1983

— al Elli Rühle, Meißen, kiu festis sian 70an naskiĝtagon la 9an de marto 1983

— al Erich Ehmig, Hildburghausen, kiu festis sian 75an naskiĝtagon la 13an de aŭgusto 1983

— al Wally Graetz el Berlin, la vidvino de la fondinto de la Esperanto-movado en GDR, Rudi Graetz, kiu festis sian 75-an naskiĝtagon la 8-an de julio 1983

Naciaj kaj internaciaj aranĝoj de GDREA 1984

I. Zentrale DDR-Veranstaltungen

1. 2. Basisseminar für Kursusleiter, 8. — 13. 4. 1984, in Lychen
2. 4. Zentrales Treffen der Esperantisten im Kulturbund der DDR, 27. — 30. 9. 1984, in Dresden
3. Jugendseminar (Basisseminar), 4. — 9. 11. 1984, in Lychen
4. 2. Expertenseminar (in Esperanto), 25. — 30. 11. 1984, in Lychen
5. Interlinguistik-Seminar, 28. 10. 1. 11. 1984, in Ahrenshoop
6. Sprachintensivkurs (für Anfänger) vom 19. — 24. April 1984 in Antonshöhe bei Schwarzenberg (Bez. Karl-Marx-Stadt)

II. Internaciaj aranĝoj en GDR 1984

7. Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo (IFER '83), 9. — 11. 3. 1984, in Leipzig. Informojn de: Organiza Komitato IFER '83, DDR — 7010 Leipzig, Pf. 713
8. Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj ĉe Berlin (IREBIK '84), Krossinsee ĉe Berlin, 2 semajnoj dum septembro 1984, lingva kurso kaj turismo. Informojn de: Distrikta Estraro Berlin de GDREA, 1020 Berlin, Breite Str. 35 36
9. Somera Esperantista Familia Tendaro (SEFT) sur kampadejo Thomsdorf, en lago-riĉa regiono de norda GDR. Informojn donas: Werner Pfennig, 2000 Neubrandenburg, Leibnitzstr. 5/67.
10. VI-a Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro (ITRE '84) de 10. — 14. 5. 1984 en Schwarzenberg. Informojn donas: Rudolf Eichler, 9430 Schwarzenberg, H.-Matern-Str. 21
11. Junulara Esperantista Biciklado, 20. 8. — 1. 9. 1984 tra norda regiono de GDR, Informojn donas: Roland Schindler, DDR — 2090 Templin, W.-Pieck-Str. 44.

Biciklado 1984

Jam ekde du jaroj junaj geesperantistoj entreprenis biciklan migradon, kies celo estas komune ekkoni la pitoreskajn pejzaĝojn de nia lando, flegi nian lingvon Esperanto kaj esti kune. Ankaŭ por la sekvonta jaro ni planas biciklan migradon, sed pli grandan ol la pasintaj. Tiu „DERSFIB—84", konsistanta el tri ĉefpartoj, okazos inter 20. 8. — 1. 9. 1984. La una parto estos la Junulara Esperanto Tendaro (JET), de la 20a ĝis la 24a de aŭgusto sur la kampadejo Markgrafenheide (A/14). La dua parto estos kvinetapa biciklado, unue laŭ la marbordo kaj poste al SEFT, kie ni volas resti ĝis la 1a de septembro. Post tio ankaŭ eblas plue tendumi ĉe Templin. Kondiĉoj estas: bone funkcianta biciklo, dormosako kaj matraco, laŭ ebleco propra tendo, konvenaj vestaĵoj . . .
Partoprenkotizo: M 10,— (antaŭe pagenda al la centra adreso)
Pli da informoj vi ricevos de Ronald Schindler, DDR—2090 Templin, W.-Pieck-Str. 44.

IFER '84

La tradicia Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo en Leipzig ankaŭ 1984 okazos. Ĝi havos la kadran temon „Scienco kaj tekniko por socia progreso".
Interesuloj petu detalajn informojn de la Organiza Komitato IFER '84, DDR — 7010 Leipzig, Pf. 713.

7a Internacia Turisma Renkontiĝo en Ercmontaro

Jam estas tradicio, ke ĉiujare okazas turismaj renkontiĝoj en la Ercmontaro de GDR aŭ sur ĉeĥoslovakia tereno. 1984 la 7a ITRE okazos de 10. — 14. 5. 1984 en Johanngeorgenstadt. Interesuloj petu informojn ĉe Rudolf Eichler, 9430 Schwarzenberg, Hermann-Matern-Straße 21.

6a plenkunsido de CE de GDREA

En Rathenow (ĉe Brandenburg) okazis la 2an kaj 3an de junio 1983 la 6a plenkunsido de CE de GDREA. Laŭ la tagordo oni traktis la rezultojn de la 16a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj ŝtatoj, havis unuan sufiĉe larĝan debaton pri aparta plano okaze de la centjariĝo de Esperanto kaj aŭskultis raportojn de la prezidantoj de la distriktaj estraroj de GDREA. En aparta punkto oni diskutis rekomendojn por la MEM-agado en la asocio. Sekvis raportoj kaj informoj. La 6a plenkunsido akceptis rezolucion kontraŭ nuklea milito kaj por paco, kiujn GDREA sendis al la Monda Asembleo por paco kaj kontraŭ nuklea milito en Prago (fine de junio 1983) kaj al la Packonsilantaro de GDR.

Esperanto-tago en Auerbach

La tradicia aranĝo okazis la 9an de julio 1983 en Auerbach kaj estis dediĉita al la honorigo de Karl Marx. La partoprenintoj plue traktis problemojn de la agado en sia regiono de suda GDR.

Johannes Palu — 70jara

Jen — la aktiva peranto por „der esperantist" en Soveta Unio, nia kara Johannes Palu el Tartu/Estona SSR, fariĝis 70jara, la 27an de majo 1983. Li apartenas al tiuj esperantistoj, kies plej alta moto estas servado, servado al aliaj. Dum multaj jaroj li helpas disvastigi nian modestan revueton „der esperantist" inter sovetuniaj esperantistoj. Pro tio nian tre koran dankon. Sed Palu ankaŭ estas elstara instruisto de Esperanto, verkis lernolibrojn kaj aliajn instruilojn. La Centra Estraro de GDREA elkore gratulas al la jubileulo — se ankaŭ kun malfruo — tamen ne malpli varme kaj sincere. Ankoraŭ multajn jarojn da sano kaj bonfarto por Johannes Palu kaj lia familio. CE de GDREA

Nova titolo ĉe APN

Ĵus aperis ĉe la sovetunia novaĵagentejo APN (Moskvo) broŝuro kun la artikolo de Juri V. Andropov „La doktrino de Karl Marks kaj kelkaj aspektoj de la socialisma konstruado en USSR", 30 p. (Moskvo) 1983). La bone presitan broŝuron mendu por viaj kluboj kaj por dissendado eksterlanden ĉe: Izdatelstvo APN, 107 082—Moskva, Bolŝaja Poĉtovaja 7, USSR.

VI-a ITRE 1983

De la 23a ĝis 28a de junio 1983 55 esperantistoj el la ercmontaraj regionoj de GDR kaj ĈSSR kaj krome el Bulgario, Hungario kaj Kanado partoprenis la VIan Internacian Turisman Renkontiĝon de Esperantistoj en Ercmontaro. Ĝi okazis ĉe la urbeto Nové Hamry ĉe Karlovy Vary. La partoprenintoj vizitis lokojn de la kontraŭfeŭda kaj parte laborista movadoj en Horni Blatná, Potuĉky, Pernink, Abertamy, Nejdek kaj Merklin.
Al la programo apartenis plue vizito de Karlovy Vary, lumbildprelegoj kaj folklora prezentado el Praha. La partoprenintoj de ITRE 1983 sendis subtenan rezolucion al la Monda Asembleo por Paco kaj vivo en Praha. Apartan dankon meritas la ĉeĥaj organizintoj kun familio Jaroslav Klement kaj la loka grupo de ĈEA en Karlovy Vary.
(laŭ Rudolf Eichler)

Distrikta renkontiĝo

Sian 13an Distriktan Renkontiĝon la esperantistoj de Berlin okazigis la 16an de septembro 1983. Ĉeestis ĉ. 80 esperantistoj, inter ili 25 eksterlandanoj el Bulgario kaj ĈSSR, kiuj partoprenis IREBIK '83 ĉe la lago Krossinsee ĉe Berlin.
Aparte surpriza estis la ĉeesto de afrika junulo el Sudafriko, membro de la liberiga movado ACN, kiu studas en GDR kaj interesiĝas pri Esperanto.
El la riĉa programo menciindas i. a. diapozitivaj prelegoj de Fritz Wollenberg pri la 68a UK en Budapest kaj pri la 3a Pionira tendaro ĉe Strausberg, prezento de kantoj de Schubert en la plenumo de Margot Berthold (kantado) kaj Michael Behr (piano) kaj prelego de d-ro Detlev Blanke „Konsideroj pri la agado de esperantistoj de GDR en la Karl-Marx-jaro". Krome bulgaroj aŭskultigis popolkantojn. La renkontiĝon finis danciga diskomuziko.

Prelego en inĝeniera altlernejo

La 21an de septembro 1983 d-ro Detlev Blanke prelegis en la Inĝeniera Altlernejo Zittau antaŭ 30 lingvistoj, instruistoj, aliaj sciencistoj kaj interesiĝantoj pri la temo „Novaj vojoj en la internacia komunikado — spertoj kun planlingvoj".

Norda renkontiĝo

55 esperantistoj el la nordaj distriktoj Rostock, Schwerin kaj Neubrandenburg renkontiĝis la 14an de majo en Güstrow.

Dankon pro reago

Nin atingis multaj sendaĵoj el 3 kontinentoj okaze de nia letervespero en januaro 1983! Tiu vespero iĝis plena sukceso. Ankaŭ plue volonte ni interŝanĝus bildkartojn kaj diversajn esperantaĵojn tutmonde. Ni preparas ekspozicion kaj tre ĝojus, se iu povus helpi al ni kaj sendus salutkartojn aŭleterojn.
Esperantorondeto Bernau (Birgit Knoll) DDR — 1280 Bernau, Eberswalder Str. 36)

„Pola Esperantisto" ne plu abonebla

Kiel informis nin la Germana Poŝto, la organo de Pola Esperanto-Asocio (PEA) „Pola Esperantisto" ekde 1984 ne plu estas abonebla pere de la poŝto. Kiel ni eksciis de PEA tio estas sekvo de la sinteno de PEA mem, kiu ne plu ofertos la revuon al la poŝto por internacia eksporto. Ĉiu interesulo pri „Pola Esperantisto" do klopodu ricevi ĝin per interŝanĝo kun siaj polaj amikoj.

Radio Polonia 6-foje en Esperanto

Aktualan programon kun precizaj indikoj pri la disaŭdigaj tempoj petu de Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, PL — 00-950 Warszawa, Al. Niedpodleglosci 77/85.

ĈebaltmaraEsperantista Printempo

Tiu tradicia aranĝo de Pola Esperanto-Asocio en Koszalin okazis ĉi-jare de 21. — 28. 5. 1983. Partoprenis ĝin el GDR i. a. delegitoj de la Distrikta Estraro de GDREA el Neubrandenburg.

KORESPONDDEZIROJ

Alĝerio

Dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj. Abdelkader Bettahar, No 8 Ave Colonel Amirouche, Eckmuhl, **Oran**

Britio

60-jara britino dez. kor. kun esp. el GDR. Maggie Hurst, 1 Laceby Road, **Scunt-harpe,** South Humberside,, DN 17 2 L B

ĈSSR

Oficistino, 28jara, dez. kor. pri ĉ. tem., kol. ludilojn, enigmojn, E-librojn, Monika Zeisová, Máchova 1215, **CS-27401-Slaný**

Dez. kor. kun filatelistoj el Jugoslavio, Mongolio, Bulgario, GDR. Ján Kurimský, Komenskeho 8, **CS-07101-Michalovce.**

GDR

Dez. kor. Else Häberlein, **DDR-9430-Schwarzenberg,** Heilig Ackerweg 24
16jara knabino dez. kor. pri hundoj, sporto, muziko. Annerose Kruwinnus, **DDR-2910-Perleberg,** Ravenslandstr. 25, PSF 194
Familio Manfred (29j.) kaj Helga Öl (24j.) dez. kor. pri moderna muziko, turismo, fotografio, kol. suvenirojn, gramofondiskojn, poŝtmarkojn. **DDR-444?-Wolfen,** Lessingstr. 9
Veterinaro dez. kor. kun samprofesionoj pri fakterminologiaj aferoj. d-ro Giso Brosche, **DDR-7981-Rückersdorf**
18-jara lernanto int. pri fremdaj lingvoj, serĉ. amikinon el GDR. Uwe Werner, **4900-Zeitz,** Steinsgrabenstr. 29
18j. faklernantino dez. kor. pri fotoj, gramofondisk., turismo. Michaela Piel, **DDR-2850-Parchim,** Waagestr. 2
Ĝardenistino, 58j. dez. kor. kun ĉ. l. pri vojaĝoj, modo, kuirreceptoj, floroj. Inge Pusch, **DDR-1601-Bindow,** Mariannenstr. 50
Lernanto 15j. dez. kor. kun knaboj el la tuta mondo pri astronomio. Torsten Neumann, **DDR-2830-Boizenburg,** E.-Th.-Körner-Straße 7
Oficistino 44j. dez. kor. kun samaĝulo pri ĉ. t. **DDR-2800-Ludwigslust,** Bahnhofstraße 12
Oficistino, 35j. dez. kor. kun esp. el soc. landoj pri muziko, lit., pentraĵoj, vojaĝoj, Sigrid Plüch, **DDR-2793-Schwerin,** Gagarinstraße 11

Francio

Sinjoro Marc Blondeel, 22 Rue Claude Debusy, **F-59130-Lambersart,** ekde nun pensiulo, dez. denove koresp. kaj interŝ. p.m.

Japanio

Maljuna laborista esperantisto, marksisto, dez. kor. en E-o aŭ germana lingvo kun resp. el GDR. H. Noda, 4-34 Shimizucho, **Nishinomiya,** 662

Kubo

Juna profesoro de angla lingvo dez. kor., interŝ. modrevuojn, gramofondiskojn de junulara muziko, diapozitivojn kaj artistfotojn. Koresp. angle, itale, Esp., parolas iom ĉeĥe. Carlos Alvarez Molina, Avenida 85 No. 10005, **Guinos,** Prov. Habana
Verkisto 28j. ankaŭ skulptisto kaj pentristo, dez. kor. pri poezio, teatro, pentroarto, junulara muziko, literaturo. Parolas Esp., angle, hispane, france kaj iomete japane. Jose L. Naranjo, Ave 47 No 7428 e/ 74 y 80, **San José de las Lajas.** La Habana
Elektro-inĝ., 35j. dez. kor. tutmonde pri E-mov. kaj div. tem, ne-kolektanto. Jorge Turinó Hernández, Joaquin de Agüero 540, **Camagüey**

Vjetnamio

Studento 18j dez. kor. tutmonde pri pentroarto, turismo, lingvoj, tekniko, bildkartoj. Trinh Ván Dúng, TK 7/16 Bén Chúóng Duong, **TP Ho Chi-Minh,** F 25-QI
D/C Nguyên Dô Khánh (VPEA), **Ho Chi Minh-urbo,** 173 A Vô Van Tan Q. 3 kol. esperantaĵojn por ekspozicio. Helpos eksterl. esp. por renkontiĝoj, prelegoj, ekskursoj en Vjetnamio

Rumanio

Proponas rumanajn pm, novaĵojn kaj laŭ mankolisto, kolektas maksimumkartojn kaj UTK, neuzitajn pm blokojn pri pentroarto, floroj, faŭno, sporto, transporto, 33 j., koresp. ankaŭ angle, hungare, france, gemane, ruse. Vajda Ioan, B-dul Garii nr. 30A, Bloc 225A, Sc. B, Ap. 18, 200 **Brasov 9,** Vojaĝonte al la urbo Brasov skribu al mi 6 semajnojn antaŭe. Mi plezure renkontus vin kaj helpus.
Lernantino 35 j, kun du infanoj, dez. kores., Szusz Lenke, 4174 Praid nr. 130, **jud. Harglita**
16j lernantino dez. kor. tutmonde pri moderna muziko, kol. bk, diapoz., p.ĉ.t. Beldianu Erika, str. Nordului BL. 12, Ap. 7, or. Codlea, cod 2252, **jud. Brasov**
Projektantino, 33j. dez. kor. tutmonde, interŝ. pm., bk pri folkloraĵoj, arkitekturaj monumentoj. Yarilena Teodoru, **Bukarest 74632,** L. Rebreanusstr. 18., Bloc A 5, sc. II, et. II, ap. 20. sektor 000, of PTTR 57

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. — Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. — Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16